

BONA ESPERO



Revuo de Suda Afriko Esperanto-Asocio

Volumo : 1995

Numero : 1

LA GAZETO - BONA ESPERO

Kontribuaĵojn, prefere maŝinskribitajn, aŭ sur diskojn en "Word Perfect 5.1" formo, oni sendu al la redaktoro:

Julian Cloete
Poŝtfako 2636
ROBINDALE
Randburg
2118

Ĉi tiu revuo iras senpage al la membroj de la Esperanto-Asocio de Suda Afriko (EASA). Interŝanĝe por aliaj revuoj, ĝi estas havebla de la kasisto. Nemembroj povas aboni, skribante rekte al la kasisto:

S-ro C Beckford
Poŝtfako 1227
CAPE TOWN
8000

La ĝenerala adreso de EASA estas:

S-ro O Sher
75 Bronkhorststrato
GROENKLOOF
Pretoria
0181

Prezidanto de EASA: J Cloete
Vic-Prezidanto: H von Blottnitz
Sekretario: O Sher
Kasisto: C Beckford
Aliaj komitatanoj: H Appel,
A Fouché, J Hammes, F Woolf,
J Spoelstra.

ENHAVOJ

	Paĝo
1. Oficistoj de EASA	1
2. El la redakto...	3
3. Ĉu vi scias la diferencon?	4
4. Demandaro	5
5. Interesaj faktoj pri ĝemeloj	6
6. Libraro	7
7. Leĝoj en Sud-Afriko	8
8. Pli multaj libroj en la libraro	12
9. Anekdotoj	13
10. Respondoj al Demandaro sur paĝo 5	14
11. La Espero	15
12. Respondoj pri diferencoj?	12
13. Reklamo	16
14. An International Language	17
15. 'n Internasionale Taal	18



El la redakto...

Saluton, samideanoj kaj gelegantoj de nia revuo *Bona Espero!* Kun la foriro de Harro von Blottnitz eksterlanden, ni perdis redaktoron kiu laboris kun *Bona Espero* dum kelkaj jaroj. Ĉar neniu volis akcepti la postenon kiel redaktoro, la nacia komitato petis min. Mi esperas, ke mi sufiĉe bone elfaros la taskon.

Nia revuo bezonas leterojn, korespondpetojn kaj artikolojn. Ne forgesu, mi petas, ke ĉi tiu revuo estas por vi kaj sen via subtenado ĝi ne povos vivi. La granda problemo estas la manko de novaj membroj, kaj por vekigi intereson ĉe novlernuloj, ni bezonas bonan gazeton. Do, mi esperas, ke mi ricevos respondojn de vi, ĉar ni bezonas vian subtenon.

Se niaj eksterlandaj legantoj legos ĉi tiun, ni volus ricevi ankaŭ viajn opinionjn kaj reagojn.

Mi esperas ke vi ĝuos la legadon!

Amike,

Julian Cloete




Ĉu vi scias la diferencon?

Kio estas la diferenco inter la sekvantaj paroj?

1. papago kaj papavo
2. gluteo kaj gluteno
3. grimpi kaj grinci
4. ĝoji kaj ĝui
5. abako kaj abato
6. absceso kaj absciso
7. absido kaj absinto
8. acero kaj aceto kaj aĉeti
9. admiri kaj admoni
10. agendo kaj agento
11. akceli kaj akcenti
12. ambio kaj ambro

(La respondoj estas sur paĝoj 10 kaj 11.)



DEMANDARO

1. Kio estas la plej granda insulo en Eŭropo?
2. Kiu komponis "Brilu, brilu eta stel'" kiam li havis nur kvin jarojn?
3. Kiu grava afero okazis la 14an de Aprilo, 1912?
4. Kio estis la familinomo de la lasta caro de Rusujo?
5. Kio okazis al la ĉefepiskopo de Krakow en 1978?
6. Kiom da antaŭaj piedfingroj havas papago?
7. En kiu urbo estas la plej granda futbala stadiono en la mondo?
8. Kio estis la nomo de la edzino de Winston Churchill?
9. Kiu estis la dua edzino de Napoleono Bonaparte?
10. Kiu estis la unua virina ĉefministro en la mondo?
11. De kiu lando devenis Aladdin?
12. Kiu skribis unu romanon plenigantan 13 volumojn, pri memoroj de la pasinteco.
13. Kio estas la familinomo de la fratoj: Dmitri, Ivan, Alyosha kaj Smerdyakov?
14. Kiu skribis Don Quixote?
15. Kiu estis la stiffratino de Anastasia kaj Drizella?
16. Kiu lando estas la hejmlando de "Varig" aerlinio?
17. Kiu estis la unua homo ĉe la suda polo?
18. Kiu eltrovis la marvojo al Hindujo tra Kabo de Bona Espero?
19. Kiu estis la imperiestro de Ĉinujo kiam Marco Polo vizitis tiun landon?
20. Kiu donis sian nomon al unu kontinento?

INTERESAJ FAKTOJ PRI ĜEMELOJ

En 1 el 80 naskiĝoj okazas ĝemeloj.

En 1 el 73 okazas ĝemeloj inter nigruloj.

1 el 100 inter blankuloj.

1 el 155 inter homoj de Azio.

Inter 80 ĝemelparoj, unu triopo de trinaskitoj naskiĝas.

Unu grupo de kvarnaskitoj okazas el 1,000,000 da naskiĝoj.


Unu grupo de kvinnaskitoj okazas el inter 20 kaj 40 milionoj da naskiĝoj.

Ekzistas ĉirkaŭ 125 milionoj da ĝemeloj en la mondo nune.

Unu en ĉirkaŭ 75,000 ĝemeloj estas "Siamanoj" t.e. kunigataj.

La ŝancoj por mult-naskitoj kreskis dum la lastaj jaroj ĉar oni uzas novajn drogojn kaj specialajn fekundigajn procesojn.

La tre famaj sesnaskitoj en Sud-Afriko havas la familinomo Rosenkowitz kaj ili nun fariĝis 21-jaroj.



LIBRARO

Ekzistas multaj libroj ĉe la hejmo de Julian Cloete en Randburg, kiuj estas la posedaĵoj de la Johannesburga E-o Societo. Se vi volas prunti libron, vi devas pagi R25, kaj kiam la libron estos redoninta, vi rericevos vian monon. Plue, ekzistas multaj libroj ĉe la Johannesburga Publika Libraro, kiujn vi povas prunti. La ĉi-kune listo estas de tiuj libroj kiujn vi povas prunti de Julian Cloete:

- "Step by step in Esperanto", Butler
- "Secondary School Esperanto I", Markarian & Sullivan
- "Secondary School Esperanto II", Markarian & Sullivan
- "Say it in Esperanto", Dover, Connor kaj Connor
- "En Ordo Malordo", A. De Lopez Luna
- "Putranta Poto", A. De Lopez Luna
- "Kiel aranĝi kursojn kaj Grupvesperojn", W. Wingen
- "Nepalo malfermas la Pordon", Tibor Sekeli
- "Raporto de la estraro de UEA pri la Agado en la jaro 1993"
- "Leteroj de E. Lanti", kun antaŭparolado de Prof G. Waringhien
- "Historia Skizo de la Internacia Ideo", G.P. De Bruin
- "Versoj Elektitaj", Sergei Jesenin
- "Systematisk kurs i Esperanto" en la Sveda lingvo
- "Mahatmo Ghandi", Huberto Rohden
(Pliaj libroj sur paĝo 12)

SUD-AFRIKAJ LEĜOJ

Por akiri scion de la leĝoj de Sud-Afriko, estas necese esplori la historion de la lando.

En la komenca periodo, la unuaj Eŭropaj vizitantoj venis de Nederlando. Ili kunportis la ekzistantajn leĝojn de tio lando. Ĉi tiuj leĝoj estis mikspotoo de leĝoj de la Romana Imperio kun pli modernaj leĝoj skribitaj de juristoj dum la 16-17aj jarcentoj. La leĝoj, kiujn Van Riebeeck kaj aliuloj uzis ĉe la Kabo, estis Nederlandaj sed kun tre fortaj Romanaj influoj. Multaj el la tekstoj estis skribitaj en la Latina.

Dum la jaroj, la samaj juristaj principoj restis la leĝoj de la kolonio de Nederlando, ĝis la tempo de Napoleono Bonaparte. Ĉar Britujo timis la perdon de la Kaba marvojo al Hindujo, Britujo decidis okupi la kolonion.

Kun la okupiteco de Britujo en 1798, la kolonio renkontis la leĝojn de la Brita Imperio. Ĉi tiuj leĝoj ankaŭ devenis de la Romananoj, sed ili ne estis la samaj. Precipe la procesoj kaj la procesejoj estis malsamaj ol tiu de la Nederlanda jursistemo.

Kiam Napoleono estis venkita en 1815, multaj ŝanĝoj okazis en Eŭropo. La kolonio ĉe la Kabo restis en la Brita Imperio. La jursistemo ŝanĝiĝis en Nederlando, kie oni enkondukis civilan kodon kaj forĵetis la malnovajn leĝojn en iliaj originalaj formoj.

Leĝoj de Sud-Afriko...

(De paĝo 8)

Britujo tenis sin ĉe la principo, ke la Kaba Kolonio povas teni kelkajn el iliaj leĝoj. Tamen, multaj de la leĝoj ŝanĝiĝis kun la influo de la Brita jursistemo.

Por ĉirkaŭ 100 jaroj, la Kaba Kolonio restis sub la estreco de Britujo. Tiam, la respublikoj de la Transvalo kaj la Oranĝa Liberŝtato ekvivis. Ili reiris al la jursistemo de la Kabo antaŭ la alveno de Britujo. La militoj inter la respublikoj kaj Britujo finiĝis kiam Britujo venkis ilin. Tiam estis danĝero, ke la leĝoj de la antaŭaj respublikoj foriĝos la samaj kial ĉe la Kaba Kolonio.

Sed, dum la unuaj jaroj de la nuna jarcento, la pluraj partioj en Suda Afriko kunvenis kaj ili formis la Unio de Sud-Afriko. Fakte, ili uzis multajn leĝojn de Britujo por formi la jursistemo de la Unio, sed ili ankaŭ retenis multajn elementojn de la Romana-Nederlanda sistemo.

La lando restis kun la sama miksa sistemo post kiam ĝi iĝis respubliko en 1961. Multaj elementoj, aparte en la procesoj de la jursistemo montras la Britan influon. Kompreneble, kie ekonomiaj kaj politikaj faktoroj ŝanĝis dum la jaroj, la influo de la Britaj (kaj eĉ de la modernaj jursistemoj en aliaj partoj de la mondo) iĝis pli forta. Tamen en la malnovaj areoj, ekzemple multaj de la krimoj, restas ĉirkaŭ la sama kiel sub la Romanaj-Nederlandaj leĝoj.

RESPONDOJ

Respondoj al la demando: Ĉu vi scias la diferencon?

1. Papago: grimpobirdo el tropikaj landoj kun brilaj diverskoloraj plumoj kaj hoka beko, kapabla imiti la homan voĉon kaj ĉiuspecajn kriojn.
Papavo: vegetaĵo kun belaj floroj, el kiu oni ekstraktas opion kaj kies semoj liveras bonan manĝeblan oleon.
2. Gluteo: sidvango, pugo, postaĵo.
Gluteno: glueca substanco, tre nutra, kiu troviĝas en la faruno de cerealoj.
3. Grimpi: pene transloki sian korpon sur oblikva aŭ vertikala supraĵo per helpo de piedoj kaj de manoj, kaj krampo.
Grinci: eligi akran malagrablan kaj tre akutan sonon pro kunfrotiĝo kun alia malmola objekto.
4. Ĝoji: senti vivan plezuron en la animo. Ekzemplo: mi ĝojas, ke vi estas ĉi tie.
Ĝui: senti egan plezuron, precipe sentuman, pro la posedo de io. Ekzemplo: estos al mi ĝojo lin revidi; ĝui la vivon.
5. Abako: supera plata parto de kolona kapitelo; ankaŭ, kalkulilo.
Abato: estro de monaĥejo titolata abatejo. (Vidu paĝo 11)

Multaj respondoj...

(Vidu paĝo 10)

6. Absceso: amaso da puso en organikaj teksaĵoj.
Absciso: unu el la du koordinatoj, kiu servas por difini punkton sur ebena.
7. Absido: duonranda funda parto de preĝejo, formanta ekstremon de la navo kaj enhavanta la ĥorejon kaj altaron.
Absinto: amararoma vegetaĵo, likvoraĵo.
8. Acero: arbo parenca je platano kaj sikomoro.
Aceto: vinagro.
Aĉeti: akiri per mono.
9. Admiri: esti ravita per ia beleco aŭ supereco.
Admoni: instigi, kuraĝigi per parolo al ia ago aŭ devo.
10. Agendo: kajero en kiu oni notas laŭ ĉiu tago la farotajn aferojn.
Agento: persono, kiu estas daŭre komisiita de iu por fari ion.
11. Akceli: plirapidigi, plifruigi.
Akcenti: plilaŭtigi la voĉon sur iu aŭ silabo vorto.
12. Ambio: speciala irmaniero de kvarpieduloj, kiam ili levas samtempe ambaŭ piedojn de sama flanko.
Ambro: parfuma substanco eltirita el intestoj de makrocefalo, odoranta analoge kiel mosko.

Pli multaj libroj en la libraro...

"Facila Legolibro", K.R.C. Sturmer
"Esperanto en Perspektivo", I. Lapenna
"The Esperanto Movement", Peter G. Forster, en
la Angla Lingvo
"La Esperanto-Movado", C. Støp-Bowitz kaj Ir
J.R.G. Isbrucker
"Psikologio kaj Metodiko de Esperanto-
Instruado", B.V. Tokarev
"La Alta Idealo", O.M. Aïvanhov
"Fundamenta Krestomatio", L. Zamenhof
"Viktimoj", Julio Baghy
"Ilustrita Lernolibro de Esperanto", L.K.
Delfi Dalmau
"Parolado en U.N.", Miĥail Gorbaĉov
"Metodiko kaj Praktiko", Zs. Barcsay
"La Lastaj estas Lastaj", Aldo Onorati
"Plukonstrue", Edwin De Kock
"Statuto kaj Regularo de Universala Esperant-
Asocio
"La Promeso de Monda Paco", Bahaa Monda Centro
"Memore al Ivo Lapenna"
"Fanny", Edna Ferber
"La Esperanta Vortfarado", Paul Fruictier
"Lingvaj Respondoj", L. Zamenhof
Angla-Esperanta Vortaro, Fulcher kaj Long
Esperanta-Angla Vortaro, E.A. Millidge
"Plena Vortaro de Esperanto"
"Plena analiza gramatiko de Esperanto",
Kalocsay-Waringheim
"Edinburgh Angla-Esperanta Vortaro", Nelson
"Tra la labirinto de la gramatiko", D.F.
Faulhaber
Komercaj vortoj en la Angla kaj la Esperanta
lingvo
"Komercaj leteroj", P. Berthelot kaj Ch.
Lambert

ANEKDOTOJ

El eseo: "Oni uzas algebrajn simbolojn, kiam oni ne scias, pri kio oni parolas."

* * * * *

"Oni diras ke virino ne povas gardi sekreton."

"Ho jes, unu."

"Kiu estas tiu?"

"Ŝia aĝo."

* * * * *

"Vi parolas Esperanton tro rapide."

"Tute ne! Vi aŭdas ĝin tro malrapide."

* * * * *

"Kiel vi progresas en la lernejo?"

"Bonege! Eĉ la instruisto diras, ke li povas instrui al mi nenion."

* * * * *

Amiko, kiu renkontas ĝemelinon: "Bonan tagon, F-ino Brun. Kiel ĉarma vi (aŭ via fratino) aspektas!"

* * * * *

Profesoro: "La cerbo de viro estas pli granda, ol la cerbo de virino. Kion tio pruvas?"

Lernantino: "Ke gravas ne kvanto, sed kvalito."

* * * * *

Estro de polico: "Do ili eskapis?"

Policano: "Jes. Ni gardis ĉiun elirejon. Do mi supozas, ke ili eskapis per unu el la enirejoj."

RESPONDOJ

Respondoj al demandoj sur paĝo 5:

1. Britujo.
2. W.A. Mozart.
3. La "Titanic" sinkis.
4. Romanov.
5. Li iĝis Papo John Paul II.
6. Du.
7. Rio de Janeiro.
8. Clementine Churchill.
9. Marie Louise de Aŭstrio.
10. S-ino Sirimavo Bandaranaike, de Sri Lankujo en 1960.
11. Ĉinujo.
12. Marcel Proust.
13. Karamazov - el la libro "La fratoj Karamzov" de F. Dostoevsky.
14. Miguel de Cervantes.
15. Cinderella.
16. Brazilo.
17. Roald Amundsen.
18. Vasco da Gama.
19. Kublai Khan.
20. Amerigo Vespucci.

LA ESPERO

(Unu el la unuaj kaj tre famaj poemoj de Zamenhof mem estas la venonta:)

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko,
Per flugiloj de facila vento
Nun de la loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion;
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantistoj.

Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.


REKLAMON

Ni ricevis diskojn de Wouter F. Pilger el Nederlando. Oni povas uzi diskojn sur IBM-kongruaj komputiloj de XT al 486, per unukoloraj, CGA, EGA, VGA, SVGA ekranoj. La nomo de la programo estas "Miksu", kaj ni havas tri diskojn:

1. Miks-brn: Nederlanda-Esperanta lernprogramo.
2. Miks-bre: Angla-Esperanta lernprogramo.
3. Miks-pro: Esperanta Proverbaro.

Ni ankaŭ havas diskojn de vortaro kion oni povas uzi en "Word Perfect" por "Spell Check".

La diskoj estas en 3.5" kaj 5.25" formatoj. Skribu al la redaktoro se vi volas havi kopiojn de la diskoj.



AN INTERNATIONAL LANGUAGE

will become accepted by all governments as the second language of every human being upon the earth. It is capable of being learned in less than 10% of the time required to learn any ethnic language.

For the purpose of international usage it is more effective, applicable and practical than any ethnic language. It will protect small threatened languages and cultures against imperialist languages. It immediately puts everyone in a position to add to - and gain from - the latest position in technology, science and human insights on every subject. It will completely wipe out illiteracy. Why? The language rules have no exceptions or inconsistencies. It is totally phonetic, especially supple, sounds good, unambiguous and precise. As a result of a brilliant system of prefixes and suffixes, it has less words to learn, a greater vocabulary than any other language. It is neutral. Electronic apparatus will never be able to translate from one ethnic language to another, but using Esperanto this will be possible. This language is the greatest revolutionary appearance since the invention of printing. Be ready for the inevitable -

LEARN ESPERANTO.

'n INTERNASIONALE TAAL

sal deur alle regerings ingevoer word as die tweedetaal vir elke mens op aarde. Dit word in minder as 10% van die tyd en moeite aangeleer, as wat vir enige ander taal nodig is.

Vir die doel van internasionale gebruik is dit baie meer doeltreffend, geskik en prakties as enige etniese taal. Dit sal klein bedreigde tale en kulture beskerm teen imperiale tale. Dit stel almal in staat om sondermeer by te dra tot - en baat by - die jongste stand van tegnologie, wetenskap en menslike insigte op alle gebiede. Dit gaan ongeletterdheid sommer uitwis! Hoekom? Die taalreëls het geen onreëlmatighede nie. Dis totaal foneties, besonder soepel, welluidend, ondubberlsinnig en presies. Weens 'n briljante stelsel van voor- en agtervoegsels, het dit minder leerbare vokabels, 'n groter woordeskat as enige ander taal. Dit is neutraal. Elektroniese apparatuur sal nooit goed uit een etniese taal in 'n ander kan vertaal nie, maar uit Esperanto wel. Hierdie taal is die grootste revolusionêre verskynsel sedert die uitvind van die drukkunde. Wees paraat vir die onvermydelike -

LEER ESPERANTO.